

Sufikso –ar/o

La sufikso –ar/o reliefigas la apartenon al kolekto de samspecaj ekzistaĵoj aŭ objektoj formanta unu tuton absolutan aŭ grupiĝon en limigita unuaĵo.

	Tuto absoluta	Grupiĝo en limigita unuaĵo
homo	La hom aro	∅
birdo	La bird aro	Ĉiele flugas ansera bird aro .
gazeto	La gazet aro	La svisa gazet aro krizas.
libro	La esperanta libr aro	Riĉas la libr aro de CDELI.
estro		La estr aro de la urbo kunsidas.
haro		Knabino kun bela bukla har aro .
ŝtupo		Impona kastela ŝtup aro .
arbo		Promeni en vasta arb aro .
verki		La originala verk aro de Zamenhof.
viro		La vir aro de la vilaĝo ekskursas.
ŝafo - kampo		La ŝaf aro paŝtas en la kamp aro .
abelo		El la abelujo forflugis abel aro .
vorto	La esperanta vort aro	Plena Ilustrita Vort aro de Esperanto.
alpo - monto		Alp aro estas vasta mont aro .
horo		La fervoja hor aro ŝanĝiĝis.
adreso		La adres aro de la klubanoj.

Aro: La sufikso –ar/o memstariĝis kun la limigita signifo de nombro da samspecaj aĵoj aŭ estoj aŭ kolekto de aĵoj formantaj tuton.

Tie kuŝis **aro** da dehakitaj arboj.

Ili ellernis **aron** da vortoj.

Venis **aro** da homoj.

Babilas **aro** da lernantoj.

Niaj kluboj grupigas **areton** da geamikoj.

Ni **arigu** la slipojn laŭ alfabetaj sub**aroj**.

Tiu disertacio estas nur **arigitaj** citaĵoj.

Alvenis **arego** da aĉetemuloj.

La publiko **ariĝas**.

Are la homoj ofte ŝovinismas.

Pri la vorto hom**aro**

Unu el la kulturaj karakterizaĵoj de la esperanta lingvo estas la absoluta rifuzo koncepti la terminon **homaro** por difini limigitan grupon da homoj. Tial esperantlingve **homaro** neniam sinonimas al gento, popolo, tribo, nacio. Esperantlingve ekzistas nur unu sola **homaro**, la tutmonda. Tiu vortfarada escepto kontraŭ la duobla rolo de la sufikso –ar/o rezultas el la penso mem de Doktoro Esperanto, kiu filozofie rifuzis la dividon de la homoj en plureco da «hom**aroj**», tio estas en plureco da hom-grupoj, kiujn apartigus malsimileco da lingvoj, religioj, haŭtkoloroj, naciaj devenoj, kutimoj, ktp.